

La Korvo (ero)

Verkis Edgar Allan POE

Tradukis Kálmán KALOCSAY

Foje, en la hor' noktmeza pri volumo stranga, peza
de scienc' forgesiĝinta mi meditis kun enu'.
Preskaŭ dorme, jam klinkape, jen, ekaŭdis mi, ke frape,
sur la ĉambropordo skrape, skrape sonas eta bru'.
"Vizitanto", mi murmuris, "sin anoncas per ĉi bru',
certe, jes, nenio plu."

Ah, memoro tro preciza! Regis la decembro griza,
fantombrojn flam' mortkriza jetis jam tra l' forntru'.
Mi sopiris je l' mateno, lege fuĝis de l' ĉagreno
pri ŝi, fea fenomeno supre trans ĉiela blu',
kiun anĝelar' Lenora nomas trans ĉiela blu',
tere -- ne nomata plu.

Min la trista, silksusura flustro de l' kurtan' purpura
skurĝis nun ĝis plej fantasta, ne sentita animsku'.
Por ke l' koro pli kviete batu, diris mi ripete:
"Vizitanto enirpete frapas ĉe la ŝlosiltru',
nur malfrua vizitanto frapas ĉe la ŝlosiltru',
certe, jes, nenio plu."